

Por marki la 150-an datrevenon de la naskiĝo
de Johann Martin Schleyer, 2.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 479, 1981.05.14 & 16

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni anoncis, ke ĉijare la urbo Lauda en Okcidenta Germanio aranĝos solenaĵon por memori la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de la planlingvo Volapük. La gimnazio de tiu ĉi urbo ricevis la nomon de Martin-Schleyer.

A.- Schleyer famiĝis internacie, kiam en 1880 li elpaŝis kun sia Volapük, kiu en la daŭro de nur kelkaj jaroj kiel unua praktikata planlingvo venke konkeras la mondon. Rapide fondiĝis kluboj, naskiĝis revuoj, aranĝiĝis kongresoj kaj kreiĝis literaturo ampleksanta ĉirkaŭ mil titolojn.

Cl.- Sed jam post sola jardeko komenciĝis falo kaj pereado pli rapida. Same kiel lia lingvo ankaŭ Schleyer mem forgesiĝas pli kaj pli.

A.- Ŝajnas, ke la reformo de Volapük, kiun li neniam akceptis, kaj la iom-post-ioma ascendo de Esperanto pli kaj pli amarigis lin. En la jaro 1900 li publikigas anoniman pamfleton **Pri la fuŝlingvo de Pseudo-Esperanto** kaj en la fino de sia vivo, kiam eĉ, en 1908, ĉesis aperi lia Volapükabled, li skribas al sia posta biografo Albert Sleumer:

Cl.- "Por sportaj stultoj ni disponas pri milionoj, por mia paca verko eĉ ne pri milono. Ho, mava homaro! Hontu ĝismorte!"

A.- Antaŭ la definitiva disfalo de Volapük, ligita kun la foriro de Rupert Kniele, iam antaŭvidita de Schleyer kiel posteulo, papo Leono 13-a nomas Schleyer *monsinjoro*. Sed tiu honorigo venas tro malfrue: Schleyer jam iĝis anakronismo.

C1.- Dum la profesia vivo de Schleyer kredeble prezentis la tipan ekzistadon de katolika pastro vilaĝa, du hobiaĵoj lin igis fama: dumtempe la poezio kaj transtemple la mondlingvo.

A.- Ni revenu al la jaro 1880, kiam Schleyer lanĉas sian Volapük. Malgraŭ la strukturaj mankoj de Volapük kaj la psikologiaj eraroj de Schleyer, kiuj ambaŭ embrie entenis la ruiniĝon de Volapük, la lingvo povis fieri pri du kvalitoj ripetataj en la planlingva propagando ĝis nun: ĝi estis relative facila kaj politike neŭtrala.

Cl.- La devizon de Schleyer sur lia unua lernolibro (menade bal pükibal - al unu homaro unu lingvo) oni ofte miskomprenis kaj eĉ hodiaŭ ĝi hipoteke ŝarĝas la Esperanto-movadon. Ankaŭ Volapük, kiel poste Esperanto, ne volis forpuŝi la ekzistantajn lingvojn, sed celis peri. Sed sian pontofaran rolon Schleyer miskomprenis kiel specon de "pontifex maximus" kaj ne rekonis, ke lingvo estas proprieto komuna. Kaj en tio sendube kunrolis la katolikeco de Schleyer, kulpanta pri ĉi duobla tendenco al universalismo kaj despotismo.

A.- Kontraste al Zamenhof tuj cedinta la personajn rajtojn, Schleyer donis al la ekestanta socia movado ĉirkaŭ Volapük konstitucion egalan al la hierarkia strukturo de sia eklezio: li mem pretendas por si la titolon datuval (la eltrovinto) aŭ ĵifal (ĉefo) kaj konfirmigas ĉi titolojn per unuanima voĉdono de la munkena kongreso en 1887.

Cl.- Interne de lia hierarkia sistemo antaŭvidiĝis jenaj rangoj:

1. lecifel: prezidanto de kontinento;
2. lecif: prezidanto de granda lando (ekzemple Germanujo)
3. cifel: prezidanto de lando (ekz. Vurtembergo);
4. xemel: ekzamenisto por iu lando;
5. plofed: instruisto por iu lando,

ĝis la minora nivelo kluba, kie ripetiĝas ĉi rango-skalo kiel mikrostrukturo: tidel (instruisto), bukal (bibliotekisto), pŭkal (kluba oratoro) kaj julan (lernanto).

A.- Jen la situacio en la jaro 1889, kiam Volapŭk jam pasis sian zeniton kaj Esperanto ankoraŭ vegetis en la ombro de nekonateco. Du kaŭzoj ĉefe kontribuis al la rapida ascendo kaj sukceso de Volapŭk: Unue, la historiaj-materiaj kondiĉoj de la tempo (ekstanta monda komerco, akceliĝo de la komunikaj sistemoj, kiuj kondukas al bezono de monda helplingvo. Due, la lingvaj strukturoj de Volapŭk, tio estas ĝia facila lerneblo kondiĉita per ĝia reguleco en la fonetiko kaj la morfologio.

C1.- La lingvistikaj kvalitoj kaj la humanisma impeto instigis la entuziasmon por la mondlingva ideo iaforte ĝis eksceso, sed kontribuis, ke Volapŭk rapide ekspansiis elirante de suda Germanujo kaj rapide konkerante la Germanan Regnon por radikiĝi ankaŭ eksterlande.

A.- Ekde 1881 Schleyer elirigis sian gazeton **Volapŭkabled** por doni centron al la juna movado kaj por teni la aferon en siaj manoj.

Cl.- Lia lernolibro ĝisvivis la naŭan eldonon en 1889.

A.- En 1884 la juna movado fortikiĝis tiagrade, ke sekvas invito al la unua ĝenerala kunveno de ĉiuj mondlingvaj amikoj. Ĝi okazas de la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto en Friedrichshafen kaj donas novajn impulsojn al la plia disvastigo de Volapŭk. Same kiel poste de Francujo eliros decidaj impluloj por la antaŭeniro de Esperanto, nun engaĝiĝas **l'Association Française pour la propagation de Volapŭk** (franca asocio por la disvastigo de Volapŭk) sub gvido de Auguste Kerckhoffs. Liaj gramatikoj, lernolibroj kaj vortaroj aperas en rapida sinsekvo kaj prilaboriĝas en multaj lingvoj.

Cl.- La propaganda ondo akcelas la fondiĝon de kluboj; novaj revuoj elkreskas kiel fungoj post pluvo, kaj la volapŭka literaturo multobliĝas.

A.- Ju pli grava fariĝas la movado, des pli formiĝas la kontraŭstaro al Volapŭk. La disputoj, polemikoj kaj studoj lingvaj de la tiama tempo prezentas la genezon de nova lingvistika disciplino: la interlingvistiko kies unua protagonisto estis la romanisto Hugo Schuchardt. Liaj pledoj por planlingvo ankoraŭ hodiaŭ estas pioniraj kaj vojmontraj.

Cl.- Sed la socia enradikiĝo pri kiu parolis Schuchardt kaj kiun postulis Zamenhof, neniam okazis ĉe Volapŭk. Kvankam estiĝis traduka literaturo, parte kun pontolingva karaktero, kaj eĉ modesta originala literaturo, tamen la demando pri ŝanĝoj kaj reformoj tro elpaŝis. Dum en 1884 Zamenhof sukcesis malebligi reformajn klopodojn en la Esperanto-movado, Schleyer vidas sin elmetita al pli kaj pli da reformaj tendencoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond, por marki la centkvindekan datrevenon de la naskiĝo de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de la planlingvo

Volapük, citis erojn el historia studo, kiun faris Reinhard Haupenthal. La kompleta raporto aperos en la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Se la temo vin interesis, skribe petu tra la kanalo de Svisa Radio Internacia ekzempleron de tiu ĉi artikolo pri Schleyer kaj Volapük. La venontan semajnon ni lastfoje pritraktos tiun ĉi nekutiman temon. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*